# Peruaj ministroj kunsidas post trudeniro kontra? la hejmo de Dina Boluarte



**En Peruo oni atendas oficialan deklaron  en la venontaj  horoj. Foto: Arkivo/La República**

Havano, mar  30 (RHK) Post la trudeniro  de teamo de la Prokurorejo kaj policaj agentoj ?e la domo de la nomumita prezidento de Peruo, Dina Boluarte, la ministroj de la prezidanteco alvenis al la Palaco de Registaro por eksterordinara kunveno por analizi la situacion de la ?tatestro.

Peruaj amaskomunikiloj raportis, ke la prezidanto de la Konsilio de Ministroj, Gustavo Adriánzen, estis unu el la unuaj aperintaj ?e la registara sidejo kune kun la Ministro pri Disvolvi?o kaj Socia Inkluzivo.

La gazetaro asertas, ke membroj de la Prezidanteco de la Konsilio de Ministroj esprimis sian indignon pri la agoj de la Prokurorejo kontra? Boluarte.

?is nun oni ne scias la lokon de la prezidanto, sed oni atendas oficialan deklaron en la venontaj horoj.

Kongresanoj kaj opoziciaj sektoroj atentigas, ke Dina Boluarte devas proponi klarigojn kaj prezenti sian tujan eksi?on de la oficejo.

Fonto: Telesur

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/350956-peruaj-ministroj-kunsidas-post-trudeniro-kontrau-la-hejmo-de-dina-boluarte

Radio Habana Cuba